



74-a IFEF-kongreso

6 - 12 majo 2023

Antverpeno



Kongreslibro



Enhavo

Salutvortoj.....	3
Pri IFEF.....	9
Prezento de la kongreslando	13
Mapo de la belga fervojlinia reto	17
Programo - ĉefprelegoj.....	18
Programo - fakprelegoj.....	19
Programo - atelieroj	23
Programtabelo	24
Programo - kursoj.....	28
Vespera programo	29
Tagordo de la komitatkunsido	33
Projekto VERDEN.....	34
Ekskursoj	36
Postkongreso.....	38
Listo de partoprenantoj.....	40
Libroservo.....	41
Enkonduko al la flandra nederlanda	42
Mapoj kaj utilaj sciindaĵoj	44

La espero, nia himno

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.
Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.
Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

*Redaktis ĉi tiun kongreslibron Piet GLORIEUX kaj Kristin TYTGAT.
Ĝin kompostis Yves NEVELSTEEN kun helpo de Lode VAN DE VELDE.
La fotoj sur la kovrilo estas de Diamond GEEZER (stacidomo) kaj
Vitor PINTO (trajno). La permesiloj de ĉiuj uzitaj bildoj estas liberaj.*

Salutvorto de la prezidanto de LKK/BEF

Nome de Belga Esperanto-Federacio (BEF) kaj la LKK mi volas tutkore bonvenigi ĉiujn al la 74-a IFEF-kongreso en Antverpeno. Ni elektis Antverpenon kiel kongreslokon ĉar tiu ĉi urbo kun sia gravega haveno kaj sia belega ĉefstacidomo estas centra trafiknodo en Belgio. Krome, dum la tuta semajno la kongresanoj povos ĝui la riĉajn kulturajn ofertojn.

Tuta teamo de belgaj esperantistoj laboris dum pli ol unu jaro por sukcesi tiun ĉi kongreson. Notu ke ni bone dividis la taskaron en diversaj partoj kiel ĉio dividiĝas en Belgio: la flandraj esperantistoj organizas la kongreson, la valonaj la postkongreson kaj la bruselaj samideanoj kunlaboras en la ekskurso al la trajnmuzeo. Mi povas jam malkaŝi al vi ke ni preparis por vi varian programon kun altnivelaj fakprelegoj, plaĉa kultura programo kaj interesaj ekskursoj.

Kial inviti IFEF al Belgio por kongresi? La respondo estas mallonga kaj simpla: ĉar trajnoj tre gravas en la historio de Belgio. Fakte la komenco de la belgaj fervojoj koincidas kun la fondo de la belga reĝolando. Belgio estis prospera lando en la 19-a jarcento kaj trajnoj tion montris.

La 5-an de majo 1835 dum sunplena tago antaŭ precize 188 jaroj la unua pasaĝera trajno veturis sur la eŭropa kontinento: de Bruselo al Mechelen,

veturo de 50 minutoj por distanco de 30 kilometroj. Dum unu el la ĉefprelegoj vi aŭdos ĉiujn detalojn pri tiu okazaĵo.

Ĉar la fervojo gravas por la komerco kaj la defendo de la teritorio, oni konstruis en la 19-a jarcento en Belgio 3000 kilometrojn da fervojaj linioj! Sed en la 20-a jarcento venis la konkurenco de la ŝiptrafikado, de aŭtoj kaj aviadiloj. La belga ŝtato konstruis grandajn aŭtovojojn en la 50-aj kaj 60-aj jaroj.

Ĉu la glora epoko de la trajno finiĝis? Plenaj vojoj kaj ekologiaj sekvoj de aŭtoveturado minacas sanan vivon. La trajno denove ludas pli kaj pli gravan rolon en la transporto kvankam por solvi la trafikajn problemojn grandaj investoj estas bezonataj. La belgaj trajnoj devas trovi sian lokon en eŭropa reto, estante ekologiaj, sekuraj kaj komfortaj.

En tiu ĉi kadro Esperanto-grupo de spertuloj sub la nomo Verden laboras pri projekto de Erasmus+ kun la subteno de la Eŭropa Komisiono. Pere de internacia kunlaboro ili pristudas la eblecojn por atingi la ĵus menciitajn celojn.

En la nomo de BEF mi deziras al vi ĉiujn agrablan kaj sukcesplenan kongreson!

Kristin TYTGAT
Prezidanto de LKK/BEF

La loka kongresa komitato (LKK) bonvenigas vin



Kristin TYTGAT
kunordigo, loĝigo,
eksteraj rilatoj



Piet GLORIEUX
financoj, programo,
kongreslibro



An OLIJSLAGERS
sekretaria laboro,
retejo



Yves NEVELSTEEN
informiloj



Nicky JANSSEN
praktika
provizumado



Clara BRACKE
akceptejo



Marc CUFFEZ
ekskursoj



Ite TYTGAT
kultura programo

Ni dankas

La kongreso sincere dankas la jenajn personojn kaj organizojn pro ilia ĉeesto dum la oficiala inaŭguro kaj pro ilia subteno:

- S-ro **Georges GILKINET**, Vicĉefministro kaj Ministro de Transporto de Belgio
- S-ro **Paul CORDY**, Urbestro de la Distrikto Antverpeno
- S-ro **Luk LEMMENS**, Unua Deputito de la Provinco Antverpeno, transporto
- S-ro **Kurt NEUWIRTH**, Ĝenerala Prezidanto de FISAIC
- La Teknika Komitato pri Kulturo de la Belgaj Fervojoj
- S-ro **Pierre LEJEUNE**, Prezidanto de la CGSP, Ĝenerala Centralo de la Publikaj Servoj por la Fervojistoj
- Modela Fervoja Klubo de la Marbordo

Kongresi en Belgio por la tria fojo estas bonega okazo rememorigi pri la kontribuo de la belgaj fervojistoj kaj esperantistoj al la disvolviĝo de nia movado, sed ankaŭ ĝermo de espero, ke ilia agado povas esti daŭrigata sukcese. La statistikoj ofte aspektas sekaj, sed ili estas ege gravaj historiaj mejloŝtonoj, kiuj priskribas dumjarajn kontribuojn de niaj movadanoj. Jen kelkaj menciindaj datrevenoj, kiujn ni povas marki fiere ĉi-jare:

- 130 jaroj ekde la mencio de la unua esperantisto pri kiu oni skribis en 1893 en Belgio;
- 125 jaroj ekde la unua E-kurso organizita en Bruselo, samtempe kun kreo de la unua E-grupo en Gilly, apud Charleroi, en marto 1898;
- 120 jaroj ekde la fondiĝo en 1903 de la Antverpena Grupo Esperantista, tiam kun 50 membroj. Dank' al la riĉa agado de tiu grupo, en 1905 en Antverpeno stariĝis la Belga Ligo Esperantista kaj ĉi-jare la grupo festas 70 jarojn de kiam la antverpenaj esperantistoj organizis la 1-an Beneluksan kongreson en 1953.

Kiam temas pri la pionira agado de la belgaj fervojistoj esperantistaj, ni markas 40 jarojn de la 35-a IFEF kongreso en 1983 en Ostendo, la dua post tiu en Bruselo, en 1964. Sed la unua mencio de 2 belgaj anoj en la internacia fervojista movado estas registrita en 1929. La Belga Esperanto Fervojista

Asocio (BEFA) ekĝermis en 1951 kaj en 1952 okazis ĝia fondkunveno en la suda stacio de Bruselo. 29 membroj aliĝis tiam al IFEF. Inter la plej konataj aktivuloj estas Lucien De Sutter (1924-2021), longtempe la ĉefkomitatano de IFEF. La posteulo de BEFA estas la nuna Belga Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj, kiu fondiĝis en 2019 por daŭrigi la longan historion de la belga movado.

Ankaŭ la fervojo en Belgio estis inter pioniroj kaj ĝuste pro tio, laŭ la propono de la Eŭropa Komisiono, la jaro 2021 estis la Eŭropa Jaro de Fervojoj, cele marki plurajn gravajn datrevenojn por la fervoja transporto, inter kiuj la 175-an datrevenon de la unua fervoja ligo inter du ĉefurboj de EU (Parizo - Bruselo).

Jen kial kongresi en lando kie la Esperanta movado estis unu inter la plej fortaj en Eŭropo kaj konatiĝi kun la posteuloj de tiuj pioniroj estas forta argumento por ege sukcesa aranĝo plurflanke: fake, kulture kaj turisme.

Mi kore salutas ne nur la belgajn, sed ĉiujn fervojistojn kaj esperantistojn, kongresanojn aŭ ne, kaj deziras sukceson plenplenan al la 74-a IFEF-kongreso en Antverpeno, Belgio!



Rodica TODOR
Prezidantino de IFEF

Salutvorto de FISAIC

Karaj partoprenantoj de la 74-a Esperantista Kongreso,

FISAIC festis sian 70-an jubileon pasintjare kaj povas retrorigardi al eventoriĉaj jaroj plenaj de kulturaj kaj sociaj aranĝoj en libera Eŭropo. Granda kaj grava parto dum multaj jardekoj – kaj ne nur en la fervoja sektoro – estas la kampo de la esperantistoj.

Tiu ĉi lingvo, kiu transiras landlimojn tutmonde kaj estas agnoskita kiel nemateria kultura heredaĵo en kelkaj eŭropaj landoj, ankoraŭ post 136 jaroj ĝuas grandan popularecon. Mi aparte ĝojas, ke post la kronviruso-kaŭza malebleco okazigi aranĝojn

finfine revenas normaleco, kaj ke eblas denove ĉeeste interkomuniki. Kiel Ĝenerala Prezidanto de FISAIC, mi dankas al



ĉiuj respondeculoj kaj organizantoj pro la realigo de ĉi tiu kongreso en unu el la plej belaj urboj de Flandrio kaj deziras al ĉiuj partoprenantoj fruktedonan interŝanĝon pri iliaj fakaj temoj kaj ankaŭ multe da amuzo dum la partopreno en la varia kaj interese kompilita programo.

Kurt NEUWIRTH
Ĝenerala Prezidanto de FISAIC

Salutvorto de FEL

Karaj aliĝintoj,

La Flandra Esperanto-Ligo, havanta sian sidejon en Antverpeno, kore bonvenigas vin “sur flandra tero”. Dum ĉi tiu kongreso vi povos gustumi ĉiujn bonaĵojn kiujn Flandrio kaj Antverpeno ofertas. Antverpeno estas kruciĝo de mondvastaj trafiklinioj, teraj kaj akvaj. Ne senkiale la Esperantomovado ĉi tie, en la urbo kaj ĉirkaŭaĵo, ekvigliĝis sufiĉe frue. En Antverpeno ankaŭ ekestis la unua Esperantoklubo de Flandrio. Ankoraŭ nun Monato kaj la retbutiko estas – sen

troigo – mondfamaj en Esperantujo.

Kiel ĉiuj mediokonsciaj homoj ni, flandraj esperantistoj, kredas ke la publika transporto grave kontribuas al daŭripova planedo. Do ni ĝojas ke ni povas kontribui al la agado de Esperanto-fervojistoj per la kungastigado de IFEF-kongreso. En la sama logiko ni engaĝiĝas en la EU-projekton VERDEN kiu celas al pli daŭripova transporto en Eŭropo al kiu parto de la ĉi-kongresa programo estas dediĉita. Ni deziras al vi instruan kaj agrablan restadon ĉi tie.

Nicky JANSSEN
Prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo

Salutvorto de la provinco Antverpeno

Estimataj gastoj,

Mi bonvenigas vin al la ceremonia malfermo de la Internacia Esperanto-Fervoja Kongreso. Jes, karaj ĉeestantoj, tio estis miaj unuaj provaj paŝoj en Esperanto. Preparante ĉi tiun paroladon, mi konsultis Vikipedion por ekscii kiel la lingvo estiĝis. Rakonto, kiun vi verŝajne ĉiuj konas, do mi nur tedus vin per mia versio en propraj vortoj.

Sed la sekva tekstoparto trafis min dum mia serĉado. La ideo estas, ke simpla, neŭtrala lingvo certigas, ke naciaj interesoj inter partioj estas flankenlasitaj, tiel ke parolantoj de malsamaj lingvoj povu komuniki unu kun la alia sur bazo de egaleco. Esperanto do strebas al egaleco ligebla al la koncepto de “tutmonda civitaneco”. Kaj vi, karaj gastoj, iras unu paŝon plu. Ne nur vi volas konstrui ponton inter diversaj lingvoj kaj kulturoj per Esperanto, sed vi iras eĉ plu. Temas pri fervoja ponto, kun la ligo inter la lingvo kaj la fervojo; ĉar trajnveturi ĉiam estas iel vojaĝi. Vojaĝado tra lokoj, landoj kaj inter kulturoj.

Mi devas konfesi, ke mi mem ne estas fervora trajnvojaĝanto. Ja mi estas vera antverpenano, kaj vi eble scias kion oni diras pri nia urbo: Antverpeno estas mondo en si mem – almenaŭ preskaŭ. Tamen pro mia mandato kiel deputito de la provinco Antverpeno mi estas nerekte sed grave ligita al la fervojo. Finfine, mi respondecas pri transporto

kaj la absoluta prioritato de nia politiko estas la konstruado de ‘fietsostrades’ – biciklo-rapidvojoj.

Ni estas firme konvinkitaj, ke trafikŝtopiĝo povas esti solvita grandparte, se homoj pli ofte uzas la biciklon inter la hejmo kaj la laborejo. Por kuraĝigi tion, ni jam investas 119 milionojn da eŭroj en ĉi tiuj ruĝaj biciklaj rubandoj laŭlonge de la vojo nur dum ĉi tiu leĝdona periodo. Vi bone aŭdis, ni konstruas ĉi tiujn biciklajn rapidvojojn ekskluzive laŭlonge de la fervojo. Biciklo kaj relo estas intime ligitaj, certe ĉe punktoj, kie ni konstruas biciklajn pontojn trans la reloj. Mi do entuziasmas pri la laborgrupo, kiu fokusiĝos pri la kunlaboro de eŭropaj fervojoj kaj la ebloj uzi biciklotransporton.

Ĉar per bona kombinaĵo de paŝado, pedalado kaj publika transporto, ni povas kune kontribui al vivebla, klimata neŭtrala kaj klimata sekura estonteco. Mi do ŝatus deziri al vi ekscitan konferencon!

Dankon!

*Luk LEMMENS
Unua deputito por la Provinco
Antverpeno, respondeca
interalie pri transporto.*



Karaj kongresanoj,

Por mi estas granda honoro sendi mesaĝon al via 74-a Internacia Kongreso de IFEF en Antverpeno, Belgio.

La temo de via kongreso, t.e. “Daŭripovo kaj transporto en Eŭropo”, vere kongruas kun la nuntempaj plej gravaj diskursoj, ne nur Eŭrop-skale, sed eĉ tutmonde.

Kiel konate, la tri ĉefaj pilieroj de la daŭripova evoluado estas daŭripovaj ekonomia, ekologia kaj socia evoluoj. Mi kredas, ke interagado de transportado kun ekonomio, ekologio kaj socio estas efektive drasta kaj decida. Se paroli tre ĝenerale kaj koncize, transportado estigas grandegan merkaton kun multnombraj labor-postenoj, same kiel ĝi ege influas la vivmedion de la tuta tera flaŭro kaj faŭno, i.a. la homajn sociojn.

Ja, la rela transportado, relative al la aliaj transport-rimedoĵoj estas inter la plej efikaj – se ne la plej efika – kun malplejmulta poluado, precipe se temas pri la modernaj sistemoj de fervojoj.

Mi kredas ke eŭropeco de via kongres-temo, povas havi rezultojn utiligeblajn ankaŭ por la aliaj kontinentoj, ĉar Eŭropo probable

ĝuas la plej densan fervoj-reton kaj tial prezentas bonegan kontinent-skalan ekzemplon.

Feliĉe, al via kongreso ne mankas tre interesaj turismaj ekskursoj – ĉiama allogaĵo de niaj kunvenoj, kaj aparte kunveno de VERDEN, ege grava projekto, kies temo estas “Daŭripova evoluo kaj transporto”, kaj kiu inkluzivas plurajn landojn kaj organizojn kaj ampleksas ne nur fervojan transportadon, sed ankaŭ biciklan – bicklo, estanta la plej pura transportilo – kaj ĝian kombinon aŭ kombineblon kun fervojo kaj aliaj puraj veturiloj, kiuj ne funkcias per fosiliaj hejtaĵoj – kaj ĉio ĉi kune kun ... Esperanto kaj instruado pri la pormediaj aferoj al la publiko!

ILEI estas honorita havi roleton en la projekto VERDEN kaj por ni estis bonega okazo i.a. prezentaĵo pri ĝi fare de Rodica TODOR en la ILEI-kongreso en julio 2022.

Bonegan kongreson!




Ahmad MAMDUHI
ILEI-prezidanto

La Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio (IFEF), starigita en 1909, estas fervoĵista asocio de esperantistoj celanta kunigi, pere de la internacia lingvo, diversfakajn profesiulojn de ĉiuj branĉoj de fervojo kaj transportado, kaj ankaŭ la amikojn de fervojo en la tuta mondo. IFEF estas ekde 1953 aliĝinta faka asocio de la Universala Esperanto Asocio (UEA), estas membro de la Internacia Federacio de Artaj kaj Intelektaj Asocioj de Fervoĵistoj (FISAIC), kaj fakte kunlaboras kun Internacia Fervoja Unio (UIC-Union International des Chemin de Fer).

La IFEF devizo estas: **“La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn”**, ĉar la Federacio kunigas landajn asociojn, individuajn membrojn kaj amikojn de fervojo de pluraj kontinentoj.

Evidente povus aperi kelkaj demandoj, ekzemple: kvankam mi estas nek dungito en fervojo, nek ebligas la ekspluatadon de fervojo, nek apartenas al branĉoj de fervojo aŭ alia transportrimedo kiel tramo, metroo, k.a., ĉu mia fako povas alporti ion interesan al tiu medio? Ĉu mi trovos lokon aŭ temon por kunlabori kun la fervoĵista esperantistaro? Ni ĉiam asertas ke, per sia tuta agado, IFEF estas malferma organizo por ĉiuj interesitoj pri historio, nuntempo



kaj estonto de transportadoj en la mondo. Ĉiu, kiu iam veturis per trajno, konas la videblan lokomotivestron kaj kelkajn aliajn fervoĵlaboristojn, sed la fervoja sistemo ne povas funkcii sen amaso de diversfakaj profesiuloj nekonataj al la ĝenerala publiko, kaj kiuj kontribuas al bona mastrumado kaj sekureco de la transporto: fakuloj pri elektronikaj reĝejoj kaj diversaj instalaĵoj, diversfakaj inĝenieroj kaj laboristoj en kaj inter stacidomoj, elektronikistoj, informadikistoj, robotikistoj, ekonomikistoj, arkitektoj, dom-, maŝin-, kaj pont-konstruistoj.

Por iĝi veraj profesiuloj la estontaj fervoĵistoj ricevas specialan instruadon kaj trejnadon, sed la sekureco de la fervoja transporto dependas ankaŭ de

iliaj personaj kvalitoj kiel respondeco, zorgemo, precizo, bona sano kaj psikologia rezisto al streso. Pro tio, apartenas ankaŭ al fervoja medio la instruistoj en teknikaj gimnazioj kaj universitatoj, la kuracistoj, flegistoj kaj psikologoj en hospitaloj, kiuj okupiĝas pri la fizika, emocia kaj psika sanstato.

Ni ne forgesu la hobiulojn inter fervojistoj, kiel la ŝak- kaj briĝoludantoj, kantistoj, dancistoj, pentristoj, radioamatoroj, filatelistoj, modelistoj, fotistoj k.a.

Por konatigi sian agadon al ekstera publiko, ĉefe inter junuloj, IFEF havas kunlaborajn kontraktojn kun universitatoj kaj aliaj fakaj organizoj (ILEI, UMEA, IKEF) kaj proponas seminariojn por studentoj de la teknikaj fakultatoj. En Universitato Pardubice, Ĉeĥio, okazis ĝis nun tri seminarioj (2019, 2021, la lasta en marto 2023).

Kunlabore kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) IFEF proponas staĝojn enlandajn kaj internaciajn por komencantoj kaj progresantoj.

Ĉiujare IFEF organizas internacian kongreson kun faka, turisma kaj kultura programoj. Kadre de la faka programo estas prezentataj divers-temaj prelegoj, inter kiuj la plej signifaj aperas en **Fervojfakaj Kajeroj**, kolekto aperinta ankaŭ en Scienca

kaj Teknika Esperanto-Biblioteko (**STEB**). Pere de la **Terminara Sekcio**, IFEF kunlaboras kun la Esperanto-sekcio de la fervoja terminaro de UIC (Internacia Fervoja Unio). La lasta kompaktdisko **“RailLexic”** enhavas pli ol 16 000 fakajn terminojn en 23 lingvoj, inter kiuj Esperanto.

IFEF eldonas ilustritan revuon **“Internacia Fervojisto” (IF)** kaj **Historion de IFEF kun Suplementoj** de la komenco ĝis nun.

En **BitArkivo** – kunlaborema komunumo, kiu volas konservi kaj gardi por ĉiam la Esperantan kulturon – estis arkivitaj la bulteno



“**Internacia Fervojisto**” kaj la kolekto “**Fervojfakaj Kajeroj**”, kiuj estas elŝuteblaj. Jen ligiloj:

mallonge.net/bitarkivo-fervojistoj

mallonge.net/internaciafervojisto

IFEF aliĝis pasintjare al programo Erasmus+ de EU, kadre de projekto VERDEN kunordigata de Universala Esperanto-Asocio, en kiu kunlaboras pluraj landaj asocioj de nia federacio kaj la Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI).

Rekonante la gravan lokon, kiun la fervojo havas en socio, laŭ propono de la Eŭropa Komisiono la jaro 2021 estis la **Eŭropa Jaro de Fervojoj**, kiu celis la markadon de pluraj gravaj dat-revenoj por fervoja transporto. Krom la historio de la fervojoj de Eŭropo, serio de konferencoj, kampanjoj kaj iniciatoj koncentriĝis al la estonteco de trajnoj kaj evidentigis la rolon de fervoja transporto kiel daŭripova, klimat-protektanta, ekologia kaj sekura sistemo de transporto. Unu el la plej allogaj eventoj estis la **internacia arta festivalo EUROPALIA**, okazinta en Belgio de oktobro 2021 ĝis majo 2022, kiu, por la unua fojo en sia historio, ne elektis landon, sed preferis specifan temon por sia plurmonata ekspozicio.

La temo estis “**Trajnoj kaj Reloj**”.

Inter la iniciatoj dum la Eŭropa Jaro de Fervojo estis la trajno “**Connecting**



Europe Express”, projekto unika implikanta la Komunumon de Eŭropaj Fervojaj kaj Infrastrukturaj Kompanioj (CER), plurajn infrastrukturajn administrantojn kaj multajn aliajn partnerojn ĉe EU kaj loka nivelo. La trajno foriris de Lisbono la 2-an de septembro kaj finis la itineron la 7-an de oktobro en Parizo, post vojaĝo kun pli ol 70 haltoj. Ĝi trairis 26 eŭropajn landojn en 36 tagoj, veturis 20 000 km-ojn da fervojaj linioj, transirante 33 landlimojn. Trakurante la tutan kontinenton, **Connecting Europe Express** sekvis itinerojn, kiuj ligas nin kune – ĉu kiel landoj, entreprenoj aŭ homoj.

Jen kiel vasta kaj plurflanka estas la agado de niaj membroj, ĉu fervojistoj, ĉu nur amikoj de fervojo. Se ni sukcesis kapti vian intereson, vi estas bonvenaj en nia familio!

*Rodica TODOR
Prezidantino de IFEF*

Listo de okazintaj IFEF-kongresoj

1. 1949 Aarhus (DK)
2. 1950 Salzburg (AT)
3. 1951 Parizo (FR)
4. 1952 Lindau (DE)
5. 1953 Utrecht (NL)
6. 1954 Verono (IT)
7. 1955 Zuriko (CH)
8. 1956 Stokholmo (SE)
9. 1957 Rijeka (YU)
10. 1958 Aarhus (DK)
11. 1959 Linz (AT)
12. 1960 Helsinko (FI)
13. 1961 Barcelono (ES)
14. 1962 Budapeŝto (HU)
15. 1963 Stoke-on-Trent (GB)
16. 1964 Bruselo (BE)
17. 1965 Hamar (NO)
18. 1966 Utrecht (NL)
19. 1967 Fulda (DE)
20. 1968 Varna (BG)
21. 1969 Avinjono (FR)
22. 1970 Rimini (IT)
23. 1971 Maribor (YU)
24. 1972 Lugano (CH)
25. 1973 Aarhus (DK)
26. 1974 Taragono (ES)
27. 1975 Villach (AT)
28. 1976 Skellefteå (SE)
29. 1977 Swanwick (GB)
30. 1978 Romo (IT)
31. 1979 Turku (FI)
32. 1980 America (NL)
33. 1981 Regensburg (DE)
34. 1982 Balatonfüred (HU)
35. 1983 Ostendo (BE)
36. 1984 Slanĉev Brjag (BG)
37. 1985 Vejle (DK)
38. 1986 Skopje (Jug)
39. 1987 Katowice (PL)
40. 1988 Perpignan (FR)
41. 1989 Salou (ES)
42. 1990 Hamar (NO)
43. 1991 Olomouc (CZ)
44. 1992 Münster (DE)
45. 1993 Cervia (IT)
46. 1994 Krems (AT)
47. 1995 Pécs (HU)
48. 1996 Hago (NL)
49. 1997 Košice (SK)
50. 1998 Aalborg (DK)
51. 1999 Le Mans (FR)
52. 2000 Budapeŝto (HU)
53. 2001 Tábor (CZ)
54. 2002 Plovdiv (BG)
55. 2003 Dresdono (DE)
56. 2004 Sopron (HU)
57. 2005 Braŝovo (RO)
58. 2006 Ŝanhajo (CN)
59. 2007 Parizo (FR)
60. 2008 Poznano (PL)
61. 2009 Triesto (IT)
62. 2010 Sofio (BG)
63. 2011 Liberec (CZ)
64. 2012 Herzberg am Harz (DE)
65. 2013 Artigues-près-Bordeaux (FR)
66. 2014 San Benedetto del Tronto (IT)
67. 2015 Kunmingo (CN)
68. 2016 Varno (BG)
69. 2017 Colmar (FR)
70. 2018 Vroclavo (PL)
71. 2019 Malago (ES)
72. 2021 retkongreso (DE/PL)
73. 2022 Beroun (CZ)

Belgio kaj Flandrio

© Vascer <https://mallonge.net/belgio23>



Belgio estas federacia lando konsistanta el tri regionoj: la Flandra, la Valona kaj la Brusela Ĉefurba. Via kongresurbo Antverpeno apartenas al la Flandra Regiono, la norda parto de Belgio. La fakekskurso direktiĝos al la Brusela Ĉefurba Regiono, “insulon” en la Flandra Regiono. La postkongreso okazos en la Valona Regiono, la suda parto de Belgio. Krom la Regionoj estas tri oficialaj lingvoj: la nederlanda, la franca kaj la germana.

La nederlanda estas oficiala lingvo en la Flandra kaj Brusela Regionoj, la franca en la Valona kaj Brusela Regionoj kaj la germana en specifa, orienta parto de la Valona Regiono. Ĉiu loĝanto de Belgio laŭ sia loĝloko/lingvo apartenas al komunumo, do ankaŭ estas tri komunumoj en Belgio: la Flandra, la Francparolanta kaj la Germanparolanta Komunumoj.

Kompreneble estas multe pli da hejme parolataj lingvoj ol la tri oficialaj lingvoj. En Antverpeno kaj Bruselo laŭdire estus pli ol 150.

Flandrio

Flandrio estas nuntempe alia nomo por la Flandra Regiono... sed la sidejo de la Flandra Registaro kaj la Flandra Parlamento troviĝas en Bruselo (la Brusela Regiono). Ambaŭ okupiĝas pri la rajtigoj de la Flandra Regiono kaj Flandra Komunumo. Flandroj estas la nomo por nederlandlingvanoj kiuj loĝas en la Flandra Regiono kaj la Brusela Regiono. Do ekzistas bruselaj flandroj kvankam kelkaj preferas nomi sin nederlandlingvaj bruselanoj.

Oni ne konfuziĝu inter la nuntempa Flandrio kaj la historia Graflando Flandrio. Ties teritorio koincidis proksimume kun la du plej okcidentaj provincoj de Belgio, parto de norda Francio kaj la sudokcidenta, nederlanda provinco Zeeland. En Francio la termino “Les Flandres” estas ankoraŭ uzata por la francaj departementoj “Nord” kaj “Pas-de-Calais”. Flandrio estas konata pro sia kombino de laboremo kaj vivĝuo. Profitu!

Antverpeno

Antverpeno (*nederlande: Antwerpen*) estas la plej granda urbo de la Flandra Regiono, la dua plej granda de Belgio. Antverpeno kaj la rivero Skeldo estas intime kunligitaj. La centro kaj malnova parto de la urbo troviĝas sur la dekstra bordo de la rivero sed estas ankaŭ nova parto kiu troviĝas sur la maldekstra bordo. Kiu diras “Antverpeno” pensas pri ĝia marhaveno. Depost la kunfandiĝo de ĝia haveno kun tiu de Zeebrugge (Bruĝo) ĝi estas la dua plej granda haveno de Eŭropo. Ĝi estas tre grava por la belga ekonomio.

Antverpeno estas la koro de la diamantindustrio kaj se temas pri komercado kaj se temas pri tajlado. Tiu industrio ekestis dank’ al judaj

loĝantoj, fakuloj pri diamantoj. Nuntempe Antverpeno estas konata kiel la Jerusalemo de la okcidento pro sia granda juda komunumo, kies anoj plejparte estas ortodoksaj judoj.

En Belgio, Antverpeno estas ankaŭ fama pro sia zoologia ĝardeno, kiu estas unu el la plej malnovaj en la mondo. Ĝi loĝigas pli ol kvar mil bestojn kaj daŭre ludas gravan rolon en la protekto de endanĝerigitaj bestoj.

Antverpeno akiris sian gravan pozicion ekde la 15-a jarcento. Tiam la urbo iĝis unu el la plej gravaj komercaj urboj de Eŭropo. En la 16-a jarcento la francdevena Christoffel Plantijn ludis gravan rolon en la evoluo de la libropresado. La fama pentristo Pieter



© Jean-Pol GRANDMONT <https://mallonge.net/urbodomo23>

Paul RUBENS estis en la 17-a jarcento eksponento de la prospero de la urbo. La tiama riĉeco nuntempe ankoraŭ videblas en diversaj partoj de la urbo, ekz. en la malnova urbo, proksime al la kongresejo.

Ne mankas vid- kaj vizitindaĵoj en la urbo. Jen kelkaj:

1. La “Stadhuis” [urbodomo] datiĝas de 1406. La nova urbodomo, ekkonstruita la 27-an de februaro 1561 kaj inaŭgurita la 27-an de februaro 1565, realigita de pluraj arkitektoj, inter kiuj Cornelis Floris II de Vriendt, estas la plej reprezenta renesanca konstruaĵo de Flandrio.
2. La bronza statuo de Brabo, laŭ la legendo juna heroo, kiu forhakis la manon de la giganto Druon Antigoon, kaj ĵetis ĝin en la riveron Skeldo. Laŭ tiu sama legendo la vorto Antverpeno devenus de “hand werpen” (= ĵeti manon). La realo tamen estas malpli romantika. La urbonomo devenas de “aanwerp” aŭ “Anoverpis”, kabo en Skeldo sur kiu oni ekkonstruis la urbon, precize tie kie nun estas la burgo.
3. Burgo “Het Steen”, kun la Ŝtata Muzeo pri Mara Navigado.
4. La Reĝa Muzeo pri Belaj Artoj (KMSKA) en Sud-Antverpeno, kun grava kolekto de pentraĵoj de Rubens kaj aliaj famaj pentristoj.
5. La antverpena zoologia ĝardeno.
6. La Centra Stacidomo (vidu ekskurson D2).
7. La muzeo MAS, moderna muzeo de la urbo. Je ĉiu etaĝo atendas nova rakonto pri Antverpeno, la fluo, la haveno kaj la mondo. Tute supre vi ĝuos 360°-panoramon super la urbo.
8. La nova justicejo en la ekstrema sudo jam aspektas tre moderna.
9. La Rubens-domo, laborejo de la fama pentristo, nuntempe ne vizitebla.
10. La katedralo de nia Kara Dipatrino, la plej granda gotika konstruaĵo de la Malaltaj Landoj, anstataŭis ekde 1352 romanikan preĝejon el 1124 kaj estis daŭre konstruata dum pluraj jarcentoj.
11. Muzeo Plantin-Moretus, laborejo de la fama presisto.
12. Muzeo Mayer van den Bergh.
13. Magazeno Sankta Felikso.
14. Van Wesenbekestraat, la Ĉina Kvartalo de Antverpeno.
15. La “Boerentoren” [turo de la kampuloj], la unua nubskrapulo sur la eŭropa kontinento, 97 metrojn alta, konstruata de 1929 ĝis 1931.
16. Sportpaleis estas giganta koncertejo, ĝi estus la plej ofte vizitata koncertejo de l' mondo (post Madison Square Garden en Novjorko).

Flandra Esperanto-Ligo kaj La Verda Stelo

Flandra Esperanto-Ligo (FEL) estas ekde 1978 la kupola Esperanto-asocio de Flandrio. Ĝi i.a. eldonas la tutmondan magazinon *Monato*, la Stafeto-librojn kaj aliajn eldonaĵojn. esperanto.be/fel

Antverpeno ĉiam estis la plej grava centro por la esperantistoj en Flandrio. En 1911, 1928 kaj 1982 okazis tie Universala Kongreso. L.L. Zamenhof persone ĉeestis la unuan. La loka Esperanto-klubo La Verda Stelo (LVS) ekzistas jam de la jaro 1907!

En la Esperantocentro en Antverpeno ekde tiam preskaŭ ĉiusemajne laŭ ilia iniciato okazas prelegoj kaj aliaj agadoj. Kutime ĉio okazas en Esperanto. esperanto.be/antwerpen


FEL kaj LVS dividis domon ĉe Frankrijklei 140 jam ekde 1981. Ne estis do facile forlasi ĉi tiun lokon kaj trovi novan sidejon. Sed danke al la persisto de kelkaj kaj la laborego de multaj volontuloj, ni sukcesis. La adreso de la nova Esperantodomo en Antverpeno estas **Lange Beeldekenstraat 169**.

10/5 (tago de la tuttaga ekskurso) la Esperantocentro estos malferma ankaŭ vespere por trinki ion kaj vidi la libroservon. Bonvenon!



Vizitantoj al la Esperantocentro dum IJK-ekskurso en somero de 2022.

© Yves NEVELSTEEN



1.1 Ella STRUG, ĉefprelego: Stacidomoj en Belgio/Antverpeno: arkitekturo kaj kultura fono

La ĉefstacidomo en Antverpeno estas unu el la plej belaj malnovaj stacidomoj en la mondo. Fervojlinio al Antverpeno estis konstruita en 1836. La konstruado de tegmento super la kajoj okazis inter 1895 kaj 1899, la ĉefan konstruaĵon kun ĝiĉetoj kaj oficejoj oni konstruis 1899-1906. Tiujn juvelojn de inĝeniera arto kaj arkitekturo ni povas admiri ĝis nun. Inter 1998 kaj 2006 oni realigis la renovigon de la malnovaj konstruaĵoj. Samtempe oni tute ŝanĝis la sistemon de la fervojlinioj al tri-etaĝa sistemo. La taga lumo atingas eĉ la plej profundan parton de la stacidomo. Tiamaniere ĝi fariĝis ankoraŭ pli speciala.



***Ella STRUG** (°1961, Pollando) estas memstara arkitekto kun propra buroo. Ŝi esperantiĝis en 1981. Aktiva membro de “La Verda Stelo”, la Esperantogrupo de Antverpeno, ekde 1990 kaj ties prezidantino 2016-2021.*

1.2 Vladimir RONIN, ĉefprelego: Historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento

En 1830-1835 Belgio ĵus naskiĝis kiel sendependa ŝtato. Ĝi havis gravan konflikton kun Nederlando kaj problemon kun la landlimoj kiuj ankoraŭ ne estis internacie rekonitaj. En tiuj cirkonstancoj la nova ŝtato tuj komencis konstrui la fervojon, la unuan sur la eŭropa kontinento. Kial kaj kiamaniere la belgoj realigis tiun neordinaran projekton, rakontos la prelego.



***Vladimir RONIN** (°1958, Moskvo) estas doktoro pri historio kaj magistro pri slava filologio. Li laboras kiel profesoro de la rusa lingvo kaj de la kulturo de Rusio en la fakultato de aplikata lingvistiko de la Katolika Universitato de Leuven (Lovenjo) en Antverpeno. Li estas la aŭtoro de i.a. ‘Antverpeno kaj ĝiaj rusoj, 1814-1914’ (1993). En tiu ĉi libro estas artikolo pri la partopreno de L. Zamenhof en la Universala Kongreso de Antverpeno en 1911. Zamenhof estis tiam regato de la caro. Aliaj publikaĵoj: ‘Rusoj kaj belgoj: ĉu la akvo estas tro profunda?’ (1998); ‘Historio de Hungario de Árpád ĝis Árpád Göncz’ (2003); kaj duparta monografio ‘Rusia Kongo, 1870-1970’ (2009) pri homoj el Rusio en belga Kongo.*

1.1 Matěj BERKA, Jaroslav MATUŠKA: Kiel kalkuli emisiojn de transporto*

Ĉi tiu prelego temas pri difino kaj kalkulo de negativa efiko de transporto sur la vivmedio. Difinitaj estas nocioj kiel karbopiedsigno, forcej-efikaj gasoj, CO₂e k.a. Prezentitaj estas sistemoj kaj metodologioj por kalkulado de CO₂e laŭ la normo EN 16258 kaj ISO 14064-1 kaj ankaŭ konkretaj en TTT publike atingeblaj kalkuliloj por determini energikonsumon kaj kvanton de forcej-efikaj gasoj el pasaĝertransporto kaj vartransporto.

Matěj BERKA (°1998, Ĉeĥio) studas (distanforme) en la lasta jaro de inĝeniera studado en Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierado, ekde 2022 laboras ĉe ČD (Ĉeĥaj Fervojoj). Li interesiĝas pri turistiko, montgrimpado kaj lingvoj. Esperantiĝis en 2021.



Jaroslav MATUŠKA (°1971, Ĉeĥio) laboris kiel trajn-ekspedisto ĉe la Ĉeĥaj Fervojoj, ekde 2001 instruas en la Universitato Pardubice, Fakultato de Transporta Inĝenierado. Liaj fakoj estas fervojtrafiko, publika trafiko kaj ĝia alirebleco por malfacilmovaj pasaĝeroj. Ekde 2020 li estas Sekretario de Fake Aplika Sekcio de la Faka Komisiono de IFEF.

1.2 Guido BRANDENBURG: “DAC - cifereca aŭtomata kuplilo”

Kiam el ĉaroj fariĝis vagonoj kaj ilin tiris ne plu ĉevaloj sed pli fortaj vapormaŝinoj, ja necesis ilin iel kupli por formi trajnkompleton. Post elprovo de diversaj malavantaĝaj solvoj meze de la 19-a jarcento la fervojoj enkondukis la ŝraŭban kuplilon el hoko kaj ŝeklo laŭlonge reguleblan per ŝraŭbo. Ĝi estas normita kaj ĉe varvagonojn ĝis hodiaŭ ankoraŭ preskaŭ senŝanĝe aplikata en Eŭropo. La klopodoj ripete fiaskis, anstataŭigi tiun nun pli ol 170 jarojn aĝan rimedon por kompili trajnkompleton per io pli eleganta, malpli temporaba kaj ne tiel postulema al homa forto: tro kosta, tro longdaŭra, tro ambicia. Nun la plano fine realiĝu kaj helpu al la fervojo en la konkuro kun la surstrata vartrafiko. Ĝis 2030 la fervojoj en Eŭropa Unio kaj

la fervoja industrio volas ekipi 450 000 varvagonojn per aŭtomata kuplilo, kiu ne nur simple kunigas la vagonojn, sed solvas tutan faskon da problemoj. Tio efektive povos esti revolucio en la fervoja vartrafiko.

Guido BRANDENBURG (°1952, Germanio) naskiĝis en esperantista kaj fervojista familio kaj mem laboris kiel inĝeniero pri sekuriga tekniko ĉe la Germana Fervojo. Ekde 2014 li aktivas en diversaj funkcioj en nacia kaj internacia organizoj de Esperanto-fervojistoj.



1.3 Rodica GIUHAT: Pendoponto super la Danubo en la zono de Braila

La ponto estas unu el la plej grandaj samspecaj konstruaĵoj en Eŭropo. La celo de la projekto estas krei modernan komunikadan vojon, kun efiko sur regiona disvolviĝado, senbarigo de la cirkulado, plibonigo de ties sekureco, malpliigo de la veturtempoj kaj malpliigo de mediopoluado en ĉiuj nuntempe traveturataj zonoj. La konstruado de la pendoponto super la Danubo en la zono Braila havas kaj nacian kaj internacian gravecon pere de konektado de la Sud-Orienta Regiono kun la transeŭropa koridoro IV kaj la tuteŭropa koridoro IX.

Rodica GIUHAT (Rumanio) estis inĝenierino-projektantino; 48 jarojn laboris en la Instituto por la Projektado de Fervojoj. Ŝia fako estis la fervojaj telekomunikado kaj aŭtomatigo.



1.4 Zlatko HINŠT: Fervoja linio inter Zagreb kaj Rijeka – ĝiaj problemoj kaj graveco en eŭropa trafika sistemo

La fervojlinio inter Zagreb kaj Rijeka en Kroatio estas parto de tuteŭropa trafika koridoro Vb (de Budapeŝto en Hungario tra Zagreb al Rijeka en Kroatio). La lasta parto de tiu fervoja linio (la traceo inter Karlovac kaj Rijeka) estis finita en la periodo 1869 ĝis 1873. La konstruado de la aliaj partoj finiĝis respektive en 1870 (t.e. la fervoja linio de la hungara-kroata limo al Zagreb) kaj en 1865 (la parto Zagreb-Karlovac). La preleganto pritraktos gravajn aferojn pri la koridoro Vb en/tra Kroatio, sed ankaŭ substrekos ke

en la jaro 2023 estas jubilea festo okaze de la 150-jariĝo de la fervoja linio Karlovac-Rijeka, kiun oni en pli vasta senco ankaŭ povas konsideri kiel festadon de la fervoja linio inter Zagreb kaj Rijeka. Tiu ĉi fervojlinio multe kontribuis al la disvolviĝo de ekonomio kaj precipe de la marhaveno en Rijeka. Estos menciitaj interesaj detaloj pri ĝia konstruado kaj pri diversaj specoj de modernigadoj de ĉi tiu fervojlinio (elektrizadoj je tensionivelo de 3 kilovoltoj kaj poste de 25 kV, teknikaj solvoj por rapidigi la transporton kaj pliigi la kapaciton). Temas pri unu el la plej malfacilaj montaraj fervojlinioj, t.e. kun deklivoj kaj vojkurbiĝoj, en Eŭropo. Ankaŭ estas interesaj variantoj de konstruado de la nova fervoja linio inter Karlovac kaj Rijeka. Temas pri konstruado de nova fervojlinio sur ebenaĵo kaj pri tio ke oni planas por la nuna ebenaĵa fervojlinio inter Zagreb kaj Karlovac krom la unutakan ankaŭ duan trakon. Kaj fine pri specifaj solvoj kaj por unutrakaj kaj por dutrakaj linioj en partoj de la traceo.



***Zlatko HINŠT** (°1954, Kroatio) vivas en Zagreb. Laŭ instruiteco li estas doktoro pri sociaj sciencoj, kampo ekonomiko. Li estas nun pensiulo post kariero en la Kroataj Fervojoj ĝis la jaro 2014. Dum laboro en entrepreno li plejparte okupiĝis pri ekonomiaj analizoj kaj ankaŭ pri sociaj esploroj, verkis multajn artikolojn tiel sciencfakajn kiel alispecajn. Li ankaŭ laboris en aliaj funkcioj. Ekde 1981 li estas aktiva esperantisto en la fervoja Esperantomovado, poste preleganto en IFEF-kongresoj, ekde 2018 ĉefkomitatano.*

1.5 Jan kaj Lene NIEMANN: FIBERTEX kaj fervojo

Prezento de la dana entrepreno FIBERTEX, kiu produktas ne-tekstitajn fibrajn produktojn, kiujn oni uzas por multaj celoj – i.a. fervojo. **Reta prelego.**



***Jan NIEMANN** (Danio) estis dum pli ol 30 jaroj trajnestro ĉe DSB (Danaj Ŝtataj Fervojoj) kaj longtempe Sekretario de Fake Aplika Sekcio de IFEF, nun pensiulo kun granda intereso ĝenerale pri fervojo. Li aktivas daŭre je la fervojfaka laboro ĉe IFEF – artikoloj, prelegetoj, terminologio.*

1.6 Vito TORNILLO: Intermodala transporto*

Intermodala transporto estas transportsistemo, kiu uzas du aŭ pli da malsamaj transportmanieroj por alporti varojn al sia celloko kaj uzas kontenerojn, moveblajn kestojn aŭ duonremorkojn, facile translokeblajn sur la malsamaj rimedoj de transporto (ŝipoj, kamionoj kaj trajnoj). Unu el la avantaĝoj de intermodala movebleco estas ke ĝi permesas uzi la plej taŭgan transport-reĝimon por ĉiu etapo de la vojaĝo. Ĉi tiu prelego prezentas interalie la ekologiajn efikojn de tiu ĉi transporto.



Vito TORNILLO (° 1958, Italio). Loĝas en Monte San Pietro, urbo apud Bologna (Italio). Profesie li deĵoris ĉe la Italaj Ŝtataj Fervojoj (FS) kiel trajnestro kaj trafik-kunordiganto, nun pensiulo. Esperanta agado: membras en IFEF ekde 1989; multe kaj efike agadis kaj agadas en la fervojista EO-movado. Partoprenis kaj estis LKK-ano en multaj IFK kaj ĉefa organizanto de la 66-a IFK en San Benedetto del Tronto en 2014. Dum lastaj IFK li okazigis ĉefajn prelegojn, kaj multe da aliaj prelegoj dum aliaj IFK-oj. Nuntempe li agadas kiel IFEA-sekretario, komitatano de IFEA en IFEF, sekretario de IFEF ekde la jaro 2010, kaj kunlaboranto en la Faka Komisiono de IFEF.

* Prelegoj kadre de projekto VERDEN.



Ateliero: Kiel kreskigi Esperantujon per Eventa Servo?

Eventa Servo (eventaservo.org) estas reta evento-diskoniga servo, kreita de Fernando Ŝajani. Ĝi estas parto de Fonduso Instigo (instigo.be), aŭspiciata de UEA. Yves Nivelsteen estas la ĉefhelpanto de la projekto. Li klarigos dum sia ateliero per ekzemploj el praktiko, kiel Eventa Servo povas konkrete kontribui al la kresko de (ne nur reta!) Esperantujo. Jen kelkaj enkondukaj vortoj:

Mi konstatas, ke la Esperantomovado ĝenerale bone fartas kaj kreskas. Estas pli da esperantistoj, ili parolas pli flue kaj okazas pli da kunvenoj. Sed tradiciaj kluboj malkreskas, kaj homoj ne plu aliĝas al asocioj. Tio donas impreson de malkresko. Ofta demando kiun aktivuloj starigas al mi estas: “Kie estas tiuj esperantistoj kiuj lernis la lingvon en interreto? En niaj kunvenoj ili ne aperas.” Kaj ili eĉ pravas! Tamen, ne senkiale ili ne aperas... La enhavo de plej multaj retejoj de lokaj grupoj kaj asocioj ofte estas malalloga kaj tre **malaktuala**. Tio donas malbonan impreson al novuloj. Ŝancon fari bonan unuan impreson oni havas nur unufoje...

Ni vivas en ĉiam pli fermita rondo kaj malbone komunikas al la ekstera mondo. Tio estas bedaŭrinda evoluo, vere. Mankas en Esperanto-retejoj informoj pri venontaj kunvenoj. “KIO konkrete okazos KIAM kaj KIE en somero kaj aŭtuno 2023 en mia

regiono?” – Jen la informoj kiujn homoj serĉas, laŭ mi.

Eventa Servo povas helpi pri tio. En la retejo <https://eventaservo.org> mem troviĝas aktualaj informoj pri multegaj eventoj – kaj se io mankas aŭ malĝustas, vi povas tion tuj mem aldoni aŭ ŝanĝi – sed eblas tiujn informojn ankaŭ diversmaniere afiŝi en via propra retejo. Vidu ekzemple:

- **Kalendaro de UEA Facila**
uea.facila.org/kunveno
- **Svisa Kalendaro**
svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro
- **Esperantistoj en Benelukso**
benelukso.eu

Pliajn konkretajn ekzemplojn kaj multajn klarigojn mi donos dum mia ateliero. Bonvenon!

***Yves Nivelsteen** (° 1974, Belgio) estas volontulo ĉe Flandra Esperanto-Ligo kaj Valona Esperanto-Asocio. Li multe okupiĝas pri kunorganizado de Esperanto-eventoj kaj pri redaktado, kompostado kaj provlegado de revuoj kaj libroj. Li verkis vortaron pri komputilaj vortoj (Komputeko) kaj manlibron pri Vikipedio. Ankaŭ pri la aktualigado de la ĝenerala vortaro nederlanda-Esperanto li okupiĝas. Cetere Yves instruas Esperanton al progresantoj en Benelukso, gvidas paroligajn rondojn kaj organizas trejnadojn.*

Programo

Sabato la 6-a de majo

15:00 -	Nigra salono	Alveno kaj akcepto
16:00 - 18:00	Blanka salono	Kunveno de VERDEN, nur por anoj
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:30 - 22:00	Gufujo	Interkona vespero

Dimanĉo la 7-a de majo

08:00 - 10:30	Manĝejo	Matenmanĝo
09:30 - 12:00	Inaŭgura salono	Solena inaŭguro - komuna foto
12:00 - 13:00	Inaŭgura salono	Akcepto / regalado
12:30 - 14:00	Manĝejo	Tagmanĝo
14:30 - 17:30		D1 - promeno - vizito de la urbo
14:30 - 17:30		D2 - promeno - vizito de la Centra Stacidomo kaj ĉirkaŭaĵo
15:00 - 18:30	Gufujo	La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:00 - 21:45	Manĝejo	Flandra Vespero - informoj kaj muziko el Flandrio

Lundo la 8-a de majo

07:30 - 09:30	Manĝejo	Matenmanĝo
09:00 - 10:15	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
09:00 - 10:15	Nigra salono	Plenkunsido IFEF, publika - 1-a parto
10:15 - 10:45	Koridoro	Kafpaŭzo
10:45 - 12:00	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
10:45 - 11:30	Nigra salono	Plenkunsido IFEF, publika - 2-a parto
11h30 - 12:00	Nigra salono	La venonta kongreso sin prezentas
12:30 - 14:00	Manĝejo	Tagmanĝo
14:00 - 15:15	Nigra salono	Laborkunsido de la faka komisiono
15:15 - 16:30	Nigra salono	Fakaj prelegoj, 1-a parto
15:15 - 18:30	Gufujo	La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo
16:30 - 17:00		Paŭzo (trinkejo estas malfermita)
17:00 - 18:00	Nigra salono	Ateliero: "VeloRelo", 1-a parto
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:00 - 21:45	Manĝejo	Kultura Vespero

Mardo la 9-a de majo

07:30 - 09:30	Manĝejo	Matenmanĝo
09:00 - 10:30	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
09:00 - 09:45	Nigra salono	Ĉefprelego 1: Stacidomoj en Belgio/Antverpeno: arkitekturo kaj kultura fono
09:45 - 10:30	Nigra salono	Ĉefprelego 2: Historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento
10:30 - 10:50	Koridoro	Kafpaŭzo
10:50 - 12:00	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
10:50 - 12:00	Nigra salono	Fakaj prelegoj, 2-a parto
12:00 - 14:00	Manĝejo	Tagmanĝo
12:45 - 18:00		F1 - ekskurso al Trainworld (Schaarbeek - Bruselo)
15:00 - 18:30	Gufujo	La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:00 - 21:45	Manĝejo	Koncerto Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović

Programo

Merkredo la 10-a de majo

07:30 - 09:30	Manĝejo	Matenmanĝo
08:40 - 17:30		T1 - Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo
14:30 - 17:30		Vizito al la sidejo de Flandra Esperanto-Ligo
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:00 - 22:00		La Esperantocentro estos malferma ankaŭ vespere. Vidu paĝon 16.

Ĵaŭdo la 11-a de majo

07:30 - 09:30	Manĝejo	Matenmanĝo
09:00 - 10:00	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
09:00 - 10:00	Nigra salono	Ateliero: "Kiel kreskigi Esperantujojn per Eventa Servo"
10:00 - 10:15	Koridoro	Kafpaŭzo
10:15 - 11:15	Blanka salono	Konversaciiga Esperantokurso
10:15 - 11:15	Nigra salono	Ateliero: "Konatiĝo kun fretocitroludado"
11:15 - 12:15	Nigra salono	Ateliero: "VeloRelo", 2-a parto
12:30 - 14:00	Manĝejo	Tagmanĝo
14:00 - 15:30	Nigra salono	Movadaj aferoj (raportoj de la laborgrupoj; strategio de IFEF), publika
15:00 - 18:30	Gufujo	La libroservo de Flandra Esperanto-Ligo
15:30 - 16:00		Paŭzo (trinkejo estas malfermita)
16:00 - 17:00	Nigra salono	Solena fermo
17:00 - 18:00	Nigra salono	Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK; estrarkunsido (nur por membroj)
18:30 - 20:00	Manĝejo	Vespermanĝo
20:00 - 21:45	Manĝejo	Adiaŭa vespero kun Saša Pilipović

Vendredo la 12-a de majo

07:30 - 09:30	Manĝejo	Matenmanĝo
10:00 -		Forvojaĝo (la ĉambroj devas esti malplenaj je 10h)

Du kunvensalonoj estas je nia dispono dum la kongresa semajno. Ili nomiĝas 'nigra' kaj 'blanka'. La vespera programo okazos en la manĝejo. Ekde la 15:00 ĝis la 01:00 la gufujoj estas malfermita. La salono de la inaŭguro ne troviĝas en la kongresejo mem: vi devas promeni ĉirkaŭ 10 minutoj tra Nationalestraat (vidu la mapon en paĝo 46). La adreso estas Thomas More, Kronenburgstraat 62, 2000 Antwerpen. Eblas uzi tramon 4 (direkto Hoboken) aŭ buson 22 (direkto Edegem UZA) ĝis la venonta haltejo 'Tropisch Instituut'.

Blanka salono	"Witte zaal"	Kongresejo etaĝo -1	Instruado
Inaŭgura salono	Salono de altlernejo Thomas More	Kronenburgstraat 62, teretaĝo	Inaŭguro
Nigra salono	"Zwarte zaal"	Kongresejo etaĝo -1	Prelegoj, atelieroj, kunsidoj
Koridoro	Niĉo en la koridoro	Kongresejo etaĝo +1	Kafumado
Gufujo	"Lounge", malantaŭa parto de "Bar" [trinkejo]	Kongresejo teretaĝo	Libroservo
Manĝejo	"Eetzaal"	Kongresejo etaĝo -1	Manĝoj kaj vespera programo

Ateliero pri fretocitro

Dum ĉi tiu ateliero, Johan Van Eenoo prezentos specialan, nekonatan muzikinstrumenton: **la fretocitron**.

La fretocitro estas malgranda kordinstrumento apartenanta al la familio de la citroj. Kiel tradicia popolmuzikilo ĝi estas konata en Nord-, Okcident- kaj Orienteŭropo. Ĝi havas diversajn naciajn, regionajn, eĉ lokajn nomojn. Eŭropaj elmigrintoj kunportis ĝin al Usono, kie ĝi ricevis la nomon

dulcimer. Se bone ludita, ĝia sono estas raviga. Dum la ateliero vi havos la eblecon mem ludi la instrumenton. Muzika kono ne necesas. Ĉestu, “gustumu” kaj ... surpriziĝu!

Johan VAN EENOO (°1956, Belgio) estas estrarano de la Flandra Esperanto-Ligo. Li loĝas en Oostkamp, vilaĝo apud Bruĝo en Flandrio, Belgio kaj, krom pri Esperanto, jam delonge interesiĝas pri folkloro. Li estas spertulo pri fretocitro ĉar en 2024 li estos ludanta ĝin jam 50 jarojn.



Ateliero: VeloRelo por Dummies

Ateliero por kreado de retejo pri biciklotransporto en trajnoj.

En la projekto VERDEN kunlaboras pluraj asocioj, inter ili IFEF kaj BEMI, pri Daŭripova Transporto, kun subvencio de Erasmus+. Unu el la subprojektoj celas krei retejon kun la nomo **VeloRelo**. Tiu

retejo donu al pasaĝeroj konsilojn, kiel kunpreni biciklon en trajnoj en diversaj landoj kaj trans landlimoj. Via tasko en la duparta ateliero estos provi en grupetoj similitan version de VeloRelo. Se vi havas porteblan komputilon, bonvolu alporti ĝin.

Lars SÖZÜER (Germanio) nuntempe ĉefe aktivas kiel Ĝenerala Sekretario de BEMI, la Biciklista Esperantista Movado Internacia, faka sekcio de TEJO pri biciklado. Li loĝas ankaŭ en Svislando, kie li laboras kiel programisto.



Beneluksa Kongreso en Bouillon

28 septembro – 1 oktobro 2023

RIVERO
ARBARO
HISTORIO



Foto: Jean-Pol GRANDMONT



PROGRAMO KAJ ALIĜILO
benelukso.eu/kongreso



Esperantokurso


Ivo DURWAEL gvidos dum la kongresa semajno **konversaciigan kurson** por samtempe komencantoj kaj progresantoj.

Jen eta klarigo pri la planoj:

En ĉiu kongreso oni renkontas homojn, kiuj sekvis kurson, povas eble sekvi prelegon sed neniel povas konversacii. Do ni uzos la eblecon

por kuraĝigi kaj maksimume praktiki konversacion per organizo de grupetoj, ĉiu sub gvido de lerta esperantisto. Ne temas pri konversacio de lertuloj, sed pri instigo de konversacie mallertuloj.

Ivo DURWAEL (°1938, Belgio) estas antverpena esperantisto. Li estis multjara Esperanto-instruisto. Tra la jaroj, Ivo Durwael estis interalie prezidanto de la antverpena grupo, plurjara estrarano pri informado de UEA, prezidanto de Movado sen Nomo, ofta kunlaboranto de Monato kaj prezidanto de Flandra Esperanto-Ligo.



Instruista Trejnado

La Interlingvistika Studoj de la
Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, PL),
Edukado.net kaj IFEI

organizas unuĵaran instruistan trejnadon,
kiu disponigos la necesajn kondiĉojn kaj lertojn por
instruado de Esperanto kaj trejnos la
partoprenantojn pri metodiko.

..... El la programo



Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kórády):

Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumentadoj, evoluiĝo de kapabloj, taksaĉo, lingva interfero, ktp)
Esperanta metodiko (elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp)
Instruhelpilo (tradiciaj kaj modernaj) / Taksaĉo kaj ekzamenoj ktp. / Provecionoj

Esperanta kulturo (Suso Moinhos, Ilona Koutny):
Tiksaj punktoj de Esperanto-gramatiko
Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de Esperanto-literaturo
Plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto
Lingva trejnado

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la L. Studoj
- Nuntempaj problemoj de e-movado (Mark Fettes)
- Nuntempa Esperanta literaturo (Suso Moinhos)

..... Kondiĉoj

Minimume B2-lingvonivelo

Prezo por unu semestro:

A-landoj: 300 EUR

B-landoj: 150 EUR

Limdato por aliĝi:

15a de aŭgusto 2023

Informoj, aliĝilo:

<https://edukado.net/trejnadon>

Mesaĝo:

interlin@amu.edu.pl



FLANDRA VESPERO

Esti en Flandrio kaj ne eklerni ion pri Flandrio/Antverpeno kaj/aŭ konatiĝi kun flandra popolmuziko, tio ne eblas! Tiu ĉi vespero kombinos ambaŭ: vivan muzikon kaj kulturajn sciindaĵojn.

Bernard kaj Lief prezentas diversajn specojn de muziko: parizajn “musetto”, judan “klezmer”, nostalgian balmuzikon, proprajn komponaĵojn por diversaj instrumentoj: akordiono, violono kaj tre malnova instrumento, la vjelo. Ekirante de la popolmuziko ili esploris dum sia kariero diversajn muzikĝenrojn, eĉ tiujn kiuj kutime

ne estas ludataj per vjelo. La rezulto de tiu instrumentokombino estas eferveska artfajraĵo de notoj, mezuroj kaj...

Akordionisto **Bernard VAN LENT** akompanis ekde la komenco la mondfaman popolkantiston/artiston Wannes VAN DE VELDE kaj multajn aliajn famajn naciajn kaj internaciajn artistojn. Li instruas akordionon.

Lief VERBEECK ludas klasikan pianon, violonon kaj vjelon kaj animas faman popolmuziklernejon en Antverpeno. La lernejo jam ekzistas pli ol 60 jarojn. En la popolmuzika medio ŝi estas plej konata kiel instruisto pri vjelo kaj pri popolmuziko.



Vespera programo

Lode VAN DE VELDE dum la Flandra Vespero distros vin per tipaj antverpenaj kutimoj kaj prezentos famajn antverpenanojn el diversaj sferoj, muzika, arta kaj alia.



Lode VAN DE VELDE (°1971, Belgio), studis kemion kaj esperantistiĝis en 1993. Li instruis Esperanton en Japanio dum 2 jaroj kaj dum diversaj renkontiĝoj. En 2016, li fondis la eldonejon “Eldonejo Libera”, en kiu intertempe aperis pli ol 50 libroj, ĉefe esperantlingvaj. Krom tio, li aktivis ĉe Flandra Esperanto-Ligo por kiu li prizorgas la eldonan agadon, kaj Movado sen Nomo. En 2020 aperis lia netipa psikologia krimromano “Aspiroj”. Krome, li ankaŭ verkas novelojn, poemojn – inter kiuj pluraj ricevis premion; kaj li aktivis kiel fotisto.

KONCERTO DE JUNAJ VIOLONISTOJ

Kvaropo da junaj arĉmuzikistoj ludos por ni konatan kaj malpli konatan klasikan muzikon. Temas pri junaj studentoj de la brusela

konservatorio. La gvidanto estas ruso Timur KOLESNIKOV, kiu fuĝis el sia hejmlando okaze de la ukrainia milito.



Koncerto en januaro 2023 en la Esperantocentro en Antverpeno.

© Kristin TYTGAT

Vespera programo

La konata duopo Saša PILIPOVIĆ kaj Georgo HANDZLIK regalos ankaŭ la partoprenantojn de la 74-a IFEF-kongreso. Je mardo ili sursceniĝos amuzan kabaredon “Mi diros al vi sekrete...”. Komencantoj ridos, progresintoj komprenos pli. Venu, vidu plej ridigan spektaklon de la jaro. Ĵaŭde Saša sole distros nin dum la adiaŭa vespero per ciganaj kantoj en Esperanto.

Saša PILIPOVIĆ (°1963, Kragujevac - Serbio) aktoras jam ekde 1991 en



la plej malnova serba teatro en Kragujevac, ĉe kiu li fondis scenejon (filion) Ŝelter. En la jubilea jaro 1987 la Studenta Esperanto-Klubo invitis lin, tiam amatoran aktoron en unu el la Zagrebaj teatretoj, roli en Esperanta teatraĵo, kaj por tio Pilipović devis lerni Esperanton. Poste li laboris kiel parolisto en la Esperanta redakcio de Radio Zagrebo, aktoris Esperante en pluraj UK-oj, Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj en kvardek landoj. Inter liaj Esperantaj spektakloj estas *Amo per proverboj* de Artur Azevedo (kun Vida

Jerman), *Poezio* de Nicolás Guillén (kun Vida Jerman), *Malfermilo* de Victor Lanoux, *Vivo de Galileo* de Bertolt Brecht, *La kredito* de Jordi Galcerán (kun Georgo Handzlik) kaj aliaj teatraĵoj, interalie, kune kun Georgo Handzlik.

Georgo HANDZLIK (pole: *Jerzy Handzlik*) estas pola kantisto de Esperanto-kantoj. Foje oni lin nomas la “Bardo sen barbo”, laŭ unu el liaj kantoj. Li gvidas en Pollando plurajn entreprenojn, el kiuj inter esperantistoj plej konata estas la eldonejo KLEKS, kiu eldonas librojn kaj sondiskojn en Esperanto kaj la pola lingvo. Georgo jam sursceniĝis en pluraj UK-oj kaj Esperanto-renkontiĝoj sole aŭ kun alia persono, kiel sia filino aŭ Saša PILIPOVIĆ. En la UK 2013 en Rejkjaviko li pro sia kontribuo al la Esperanto-muziko kaj eldona agado estis honorigita per Diplomo pri Elstara Arta Agado de UEA.



Eŭropa Esperanto-Kongreso

8a-12a de majo 2024

Strasburgo - Francio



Temo : Dialogo inter eŭropaj popoloj, paca vektoro



Strasburgo bonvenigas vin por interasocia Eŭropa Esperanto-Kongreso en majo 2024, okaze de la **Eŭropa tago**. Bunta **kultura** kaj **kleriga programo** estas jam preparata kun pluraj eŭropaj landoj kiuj iĝis partneroj de la evento kunorganizata de **Germana Esperanto-Asocio**, **Internacia Fervojista Esperanto-Federacio** kaj **Unuiĝo Franca por Esperanto**. Pluraj **ekskursoj** estos proponataj por malkovri la urbon Strasburgo kaj la regionon Alzaco. Ni povos ĝui la vastan spacon de la Universitato de Strasburgo, kiu situas **centre de la urbo** kaj ofertas vastan eksteran herbejon por renkontiĝi. La urbo Strasburgo faciligas la **moviĝojn** per tramoj, busoj kaj bicikloj, famas pro sia **gastronomio** kaj disponigas multajn **loĝeblecojn**. Jam rezervu la datojn, kaj aliĝu tuj en aŭtuno 2023 kiam aperos la aliĝilo !



Organizata de :



Kun la apogo de :



Kun la subteno de :



TAGORDO DE LA ĜENERALA ASEMBLEO (Komitatkunsido)
en la 74-a IFEF-kongreso en Antverpeno (BE) 06-12.05.2023

- 1. Malfermo, konstato de la mandatoj**
- 2. Ricevitaj mesaĝoj**
- 3. Honorigo al la mortintoj**
- 4. Estraranaj raportoj**
 - 4.1. Sekretario
 - 4.2. Redaktoro
 - 4.3. Kasisto
- 5. Diskuto kasraporto-bilanco 2022/buĝeto 2024, kotizkonfirmo**
- 6. Protokolo IFK Beroun**
- 7. Raporto de la ĉefkomitatano**
- 8. Resumo de la jarraportoj 2022 el la landaj asocioj**
- 9. Situacio asocioj en kelkaj landoj**
- 10. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)**
 - 10.1 Sekretario Fake Aplika Sekcio (FAS),
 - 10.2 Sekretario Terminara Sekcio (TS)
- 11. Raportoj de la komisiitoj**
 - 11.1 Komitatano “A” de IFEF ĉe UEA.
 - 11.2 Rilatoj al aliaj organizoj: FISAIC; SAT; ILEI; UMEA; ISAE; TAKE; IKEF
 - 11.3 Raportoj de la laborgrupoj
 - 11.4 Fakdelegitoj ĉe UEA
- 12. Kongresproponoj**
- 13. Venontaj kongresoj**
 - 13.1 Konfirmo de la invito al la 75-a IFK en 2024 en la urbo Strasburgo (Francio)
 - 13.2 Elekto de la lando por la 76-a IFK en 2025 Slovakio
 - 13.3 Diskuto/propono pri pluaj eblecoj: 2026, 2027
- 14. Movadaj Aferoj:** (dum la Movada Forumo)
 - 14.1 Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF
 - 14.2 Strategia laborplano
- 15. Eventualajoj:** Libera diskutado

La sekretario
Vito TORNILLO

Projekto VERDEN

La bezono de la Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio kunlabori kun pluraj fakaj asocioj kaj la ĝermaj ideoj aperintaj okaze de la Eŭropa Jaro de Fervojoj (2021) estis esprimitaj dum pluraj renkontiĝoj kaj en la forumo de la Universala Esperanto-Asocio. Sed la ebleco valorigi ilin en konkreta projekto aperis nur kadre de la nova sepjara Erasmus+-programo 2021-2027.

La projekto VERDEN kunordigata de Universala Esperanto-Asocio okazas per kunlaboro de IFEF kaj Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI).

La IFEF-partneroj estas:

- Ĉeĥa Fervojistista Esperanta Asocio kaj Universitato Pardubice, kun kiu IFEF havas kunlaboran kontrakton;
- Franca Fervojistista Esperanto-Asocio;
- Itala Fervojistista Esperanto-Asocio, per siaj membroj en Associazione

Esperanto Giorgio Canuto di Parma;

- Belga Amikaro de Fervojistaj Esperantistoj, kun la subteno de Flandra Esperanto-Ligo.

La temo de la projekto VERDEN estas: “Daŭripova evoluo kaj transporto”, kunlige al pli ĝenerala kaj aktuala temo pri la klimatprotektado kaj daŭripoveco. La projekto celas ĉefe aldoni novajn interfakajn perspektivojn, ekz. diversflanka traktado de pluraj edukaj direktoj, per:

- trejnado de malpli spertaj kaj malgrandskalaj agantoj (lokaj kluboj) dum projekto,
- envolvigo de plenkreskuloj kaj junuloj, por ebligi diversnivelan spertiĝon de novaj aktivuloj,
- varbado pri Esperanto-kursoj por faciligi internacian kunlaboradon, ĉar la lingva komunikilo estas ĉefe Esperanto.

Konsilas nin spertaj instruistoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

verden 

Projekto VERDEN

Plej grave estas ke ni celas atentigi pri la efiko de diversaj transportiloj al klimataj ŝanĝoj kaj pri la neceso de eŭropa kaj tutmonda agado ĉi-direkten. Tio inkludas:

- fervojon,
- bicikladon,
- kombinadon de biciklado kun publika transporto,
- varbadon por ĉiuj transportrimedoj kiuj estas karbonneŭtralaj aŭ klimat-favoraj.

Por la laboro ni havas je nia dispono plurajn ilojn, nome enketilojn kaj kolektadon de informoj pri temoj kiel:

- medioprotektado ĉe fervojo,
- internacia kaj enlanda pasaĝer-transportoj,
- horaroj kaj instrukcioj pri bicikloj en trajnoj,
- mapado de nefunkciaj fervoj-linioj,
- mapado de verdaj biciklo-vojoj.

FLAM[SWOT]-analizo (Fortoj/Lamaĵoj/Avantaĝoj/Minacoj) estas tasko por la partoprenantaj gestudentoj de la Teknika Fakultato de Pardubice, pri:

- komparo de diversaj specoj de var- kaj pasaĝera transportoj per fervojo, aŭto, aviadilo, biciklo el vidpunktoj: poluado kaj komforto (rapideco, sekureco, ktp.);
- diversaj kalkuloj de emisioj de forcejaj gasoj (CO₂), energio-

konsumo de diversaj transport-specoj, ktp.

Pluraj etapaj renkontiĝoj (ĉu fizikaj, ĉu retaj) pritraktas la kolektadon de la rezultoj kaj ebligas la daŭrigon de la interfaka internacia kunlaboro. La konkludoj de nia partnera laboro aperos en broŝuro kun:

- ekzemploj pri la situacio en kelkaj eŭropaj fervojoj rilate al strebado por daŭripova transporto;
- konkretaj, uzablaj konsiloj por la organizantoj de renkontiĝoj kaj aliaj aktivuloj, cele ebligi organizadon de “verdaj aranĝoj” lokaj, naciaj kaj internaciaj.

Ĝi estos prezentata en julio ĉi-jare, dum la Universala Kongreso de Esperanto, en Torino.

Plie, retejo pri konkretaj instrukcioj en diversaj landoj koncerne transporton de bicikloj en trajnoj estas antaŭvidita.

Tiu ĉi partnera projekto VERDEN instigas ne nur la esperantistojn pritrakti tre gravan kaj aktualan temon, sed ankaŭ turnas sin al la ekstera mondo, gazetaro, aliaj organizaĵoj, politikistoj, por montri ke per Esperanto eblas internacie kunlabori pri seriozaj temoj, kaj havi signifan efikon.

*Rodica TODOR
Prezidantino de IFEF*

D1 – dimanĉo la 7-a de majo

Promeno en la historia centro

Estos promeno de ĉirkaŭ tri horoj en la malnova centro. Ni laŭiros Groenplaats, la katedralon, la urbodomon kaj la riveron Skeldo.

Ĉiĉerono: Prof. Dr. Vladimir RONIN.

Ekiri je 14:30 ĉe la enirejo de la kongresejo.

D2 - dimanĉo la 7-a de majo

Promeno al la centra stacidomo kaj juda kvartalo

Estos promeno de ĉirkaŭ tri horoj al la centra stacidomo kun arkitektura klarigo. Dum la promeno vi ankaŭ vizitos la judan kvartalon.

Ĉiĉeronino: Ella STRUG.

Ekiri je 14:30 ĉe la enirejo de la kongresejo.

F1 - mardo la 9-a de majo

Fakvizito al la trajnmuzeo “Train World” (Schaarbeek - Bruselo)

Vidu pli da informoj pri la muzeo je la sekva paĝo.

Ĉiĉerono en la muzeo: Bernard-Régis LARUE.

Akompananto: Marc CUFFEZ.

Ekiri je 13:00. Reveno planita je 18:30.

T1 - merkredo la 10-a de majo - tuttaga ekskurso

Matene perbusa vizito al la impona antverpena haveno kun loka ĉiĉeronino. Paul DE COOMAN estos via interpretisto.

Pantagmanĝo en la Kanada kaj Pola Muzeo en Adegem. Poste ekde la stacidomo de Maldegem veturo per trajno kun vaporlokomotivo sur mallarĝa ŝpuro al Donk (antaŭa trajnlinio Maldegem - Bruĝo) kaj vizito de la muzeo.

Ekiri je 08:40. Reveno planita je proks. 18:00.

Gvidanto: Marc CUFFEZ.



Train World

Train World (*EO: Fervoja Mondo*) estas muzeo de la Nacia Societo de la Belgaj Fervojoj. Ĝi troviĝas en la brusela municipo Schaarbeek kaj okupas la iaman stacidomon de Schaarbeek kaj novan konstruaĵon.


La muzeo estis inaŭgurita la 24-an de septembro 2015. La interno de la muzeo estis desegnita de François Schuiten, belga bildrakontisto. Antaŭe, la Belgaj Fervojoj havis nur malgrandan muzeon kiu troviĝis interne de la stacidomo Bruselo Norda.

Kolekto

La muzeo posedas 22 veturilojn (lokomotivojn kaj vagonojn) kaj ankaŭ multajn maketojn, uniformojn kaj aliajn objektojn.

Kelkaj rimarkindaj objektoj de la muzeo estas la vaporlokomotivo Land van Waes/Pays de Waes, la plej malnova lokomotivo en Belgio (1845) kaj la vaporlokomotivo 12.004, la plej rapida belga vaporlokomotivo (1939).

trainworld.be



Vendredo 12/5 Bois du Cazier

La regiono de Charleroi [prononcu: Ŝarlerŭa] estas ankaŭ konata sub la nomo “La Nigra Lando” (pro siaj karbominejoj). La “Bois du Cazier”, loko kie okazis grava mintragedio, estas memoriga ejo en la komunumo Marcinelle, rekonita kiel Tutmonda Heredaĵo fare de UNESKO. La katastrofo okazis la 8-an de aŭgusto 1956 pro homa eraro. 262 ministoj perdis la vivon. Ili devenis el 12 diversaj landoj. La plej multnombraj estis italoj (136) sed ankaŭ 95 belgoj pereis. Nur 13 ministoj estis savitaj. Ok monatojn post la katastrofo la laboro rekomenciĝis. Oni elfosis karbon ĝis 1967. Nuntempe la ejo estas renovigita kaj restarigita kiel

ĝi estis en 1956 (kradoj, konstruaĵoj, pavimeroj ktp.). En la sama ejo troviĝas ankaŭ la muzeo de la industrio.

Sabato 13/5 Namuro, dinamika urbo

Kun pli ol 110 000 loĝantoj la urbo Namuro [france: Namur] estas la tria (plej grava) urbo en Valonio kaj ankaŭ la ĉefurbo de la Valona Regiono. Namuro gastigas multajn valonajn instituciojn kaj estas ankaŭ instiganto de la disvolviĝo de Valonio. La urbocentro de Namuro proponas senkomparan medion por promeni aŭ gapvagi ĉu kiel familio ĉu kun amikoj. Ĝia komerca oferto estas densa, diversa kaj altkvalita: pli ol 800 butikoj troveblas tie.



La citadelo de Namuro

La citadelo de Namuro, origine kastelo de la grafoj de Namuro, estas iama fortikaĵo kiu poste fariĝis citadelo. Superstarante la urbon ĉe la kunfluejo de Sambro kaj Mozo, ĝi estas unu el la plej grandaj citadeloj en Eŭropo. Ĉio, ekde ruinoj de la grafa kastelo ĝis pli freŝdataj bastionoj kaj kanonterasoj, atestas pri pli ol miljara historio. Ĝia pinto atingas altecon de 190 m. Telfero konektas la urbocentron kun la citadelo.

Dimanĉo 14/5

La ŝiplifto de Strépy-Thieu

Dudek jaroj da laboroj necesis por munti tiun nekutiman grandegan konstruaĵon, kiu dum multaj jaroj estis la plej granda ŝiplifto de la mondo. Ĝi anstataŭis la kvar antaŭajn liftojn de la Kanalo de la Centro kaj du kluzojn, t.e. entuta niveldiferenco de 73,15 m. Ĝiaj du ŝipkuvegoj kapablas ricevi la plej pezajn navigilojn. Ekde 2002 la trafiko de la funikulara lifto



© Jean-Pol GRANDMONT <https://mallonge.net/lifto23>

iris de proksimume 30 000 toneloj monate al 200 000 toneloj monate. Se oni scias, ke unu barĝo de 1350 toneloj egalas ĉirkaŭ 90 kamionojn, tiu perakva konekto ebligas forte malŝarĝi la valonajn aŭtovojojn. En 2021 2,11 milionoj da varoj pasis tra la ŝiplifto de Strépy-Thieu.

Michèle VILLERS

Praktike (por aliĝintoj al la postkongreso)

Ni forte konsilas al vi preni la trajnon de 10:54 en la Centra Stacidomo de Antverpeno. Estas rekta trajno al stacidomo Charleroi-Central kiu (normale) alvenos je 12:36. La ĉeforganizanto de la postkongreso, Michèle VILLERS, atendos vin en la stacidomo de Charleroi. La tranoktejo troviĝas je malgranda distanco de la stacidomo. Marc CUFFEZ akompanos vin matene de la kongresejo al la Centra Stacidomo.



Listo de partoprenantoj IFEF-kongreso Antverpeno

Antaŭnomo	Nomo	Lando
Anna	ABELOVSKA	Ĉeĥio
Ioana Cristina (1)	ALDESIU	Rumanio
Kazue	AUDIBERT	Francio
Andras (1)	BARCSA	Hungario
Matej	BERKA	Ĉeĥio
Danuta	BIADACZ	Pollando
Janina	BOROWIECKA	Pollando
Jan	BOROWIECKI	Pollando
Anne	BRABANT	Belgio
Clara	BRACKE	Belgio
Mariana (1)	BRADLER	Rumanio
Guido	BRANDENBURG	Germanio
Lydia	BUYST	Belgio
Korine	CHEIZOO	Nederlando
Marc	CUFFEZ	Belgio
Jeannine	DAGUIN	Francio
Christian	DARDENNE	Francio
Paul	DE COOMAN	Belgio
Hans	DELNAT	Belgio
Therese (2)	DEQUIDT	Francio
Andreas	DIEMEL	Germanio
Klaas	DIJKSTRA	Belgio
Anna	DUPECHAUD	Francio
Ivo	DURWAEI	Belgio
Peter	EBENAU	Nederlando
Bodo (1)	EHRlich	Germanio
Agnes	GEELen	Belgio
Rodica (1)	GIUHAT	Rumanio
Piet	GLORIEUX	Belgio
Malgorzata	GREGOROWICZ	Pollando
Józefa	GREGOROWICZ	Pollando
Patrick	HAERICK	Belgio
Ladislav (1)	HAKL	Ĉeĥio
Vinjo	HANDZLIK	Pollando
Georgo	HANDZLIK	Pollando
Denise (1)	HAPPI-FOSSO	Francio
Zlatko	HINŠT	Kroatio
Alex	HUMET	Belgio
Gerd	JACQUES	Belgio
Nicky	JANSSEN	Belgio
Rita	KETELERS	Belgio
Liliane	KETELERS	Belgio

Antaŭnomo	Nomo	Lando
Ladislav (1)	KOVAR	Ĉeĥio
Jaroslava (1)	KOVAROVA	Ĉeĥio
Elzbieta, Zofia	KRAWIEC	Pollando
Jan	KUKLA	Ĉeĥio
Marta	KUKLOVA'	Ĉeĥio
Eduard	KUSTERS	Belgio
Bernard-Régis	LARUE	Belgio
Wieslaw	LIBNER	Pollando
Maria	LITWINIAK	Pollando
Katja	LÖDÖR	Belgio
Jaroslav	MATUSKA	Ĉeĥio
Francesco	MAURELLI	Germanio
Ksenija	MILIC-ŠTRKALJ	Kroatio
Yves	NEVELSTEEN	Belgio
Frederic	NEYRET	Francio
An	OLIJSLAGERS	Nederlando
Gunnar (1)	OLSSON	Svedio
Barbara	PAWLAK	Pollando
Leen	PEETERS	Belgio
Sasa	PILIPOVIC	Serbio
Teresa	POMORSKA	Pollando
Sorin (1)	PORUPCA	Rumanio
Barbara	POTERUCHA	Belgio
Robert (1)	POURCHIER	Francio
Halina	RADOLA	Pollando
Vladimir	RONIN	Belgio
Francine	SCHWARTZ	Francio
Lars	SÖZÜER	Germanio
Maria Rosaria	SPANO	Germanio
Remy	SPROELANTS	Belgio
Jerzy	STEFANSKI	Pollando
Ella	STRUG	Belgio
Margaretha	SYMOENS	Belgio
Grazyna	SZUBRYCZYNSKA	Pollando
Elena (1)	TIRON	Rumanio
Rodica (1)	TODOR	Rumanio
Vito (1)	TORNILLO	Italio
Emil (1)	TUDORACHE	Rumanio
Kristin	TYTGAT	Belgio
Ite	TYTGAT	Belgio
Lode	VAN DE VELDE	Belgio
Eddy	VAN DEN BOSCH	Belgio
Johan	VAN EENOO	Belgio
Laurent	VIGNAUD	Francio

(1) partoprenas ankaŭ la postkongreson

(2) partoprenas nur la postkongreson

Jen kelkaj verkoj pri Antverpeno kaj Bruselo kiuj estas haveblaj en la libroservo de Flandra Esperanto-Ligo:

8 antverpenaj legendoj

Antverpeno estas ege malnova urbo, kiu unuafoje aperis en la kronikoj de la jaro 684, sub la nomo Antverpia. Neeviteble do tiu ĉi malnova urbo naskis multajn popolajn legendojn. En tiu ĉi libreto ni kompilis la plej konatajn legendojn el la urbo. Por la ŝatantoj de legendoj, ni aldonis fine de tiu ĉi libreto ankoraŭ du aliajn legendojn el Belgio, nome pri la mondvaste konata statueto de “Manneken Pis”. La libreto estas tutkolora kaj ilustrita.




Blua sonĝo en Antverpeno

Post la aventuro en Brazilo, kiam ili devis solvi la enigmon de “La malbeno de Tarumo kaj Nurana”, Andrea, Hua, Mavomo, Roza kaj Eriko renkontiĝas denove por klarigi novan misteron, nun en Antverpeno, Belgio. Du aliaj personoj kuniĝas kun ili: la knabino Klara kaj la juna diplomato Lufimpu. En streĉa tago, ili havas malmultajn horojn por forkuri de danĝera bandito, liberigi senkulpan viron kaj ankoraŭ evitigi tragedion en hotelo, kie okazas grava kunsido de UN. Por tio, ili bezonas deĉifri mesaĝon pri la Blua Sonĝo.



La Brusela Bubo - Cisko kaj Vinjo

Bildrakonto en sufiĉe facila Esperanto, amuza kaj agrabla por infanoj kaj por plenkreskuloj. “La Brusela Bubo” estas traduko de la rakonto numero 180 el la serio “Suske en Wiske” de Willy Vandersteen. Ĝi estas la unua esperanta traduko de nederlandlingva populara kaj mondfama bildrakonto, jam tradukita en multdekojn da lingvoj.



Enkonduko al la flandra nederlanda

Kelkaj frazoj en Esperanto kaj en la flandra varianto de la nederlanda lingvo, la oficiala lingvo de Flandrio:

ESPERANTO	NEDERLANDA	PRONONCADO
Bonan tagon (matenon, vesperon)!	Goeiedag, goeiemorgen, goeie avond!	hujədaĥ, hujəmorhən, hujə aavənd
Bonan apetiton!	Smakelijk!	smaakələk
Jes!	Ja!	jaa
Ne!	Nee!	nee
Dankon!	Dank u!	dankü
Mi petas; bonvolu	Alstublieft	alstüblift
Pardonu!	Sorry, verontschuldig me, excuseer!	vərontŝhüldəĥ mə, ĕksküzeer
Mi ne parolas/komprenas la nederlandan	Ik spreek geen Nederlands	ĕk spreek heen needərlənds
Mi ne komprenas vin	Ik versta je niet	ĕk vərstaa jə nit
Skribu tion al mi, mi petas	Schrijf dat voor mij op alstublieft	ŝhrejf dat voor mej op...
Kiom ĝi kostas?	Hoeveel kost dat?	huvuel kost dat?
1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10	één, twee, drie, vier, vijf, zes, zeven, acht, negen, tien	een, tüee, dri, vir, vejf, zes, zeevən, aĥt, neehən, tīn
Bonvolu montri al mi la vojon al ...	Kunt u mij de weg wijzen naar...	künt ü mej də ŭeg ŭejzən naar...
... la stacidomo, la tramhaltejo, la butikoj	... het station, de tramhalte, de winkel	hət stasion, də tramhaltə, də ŭinkəl
Kie estas necesejo?	Waar is het toilet?	ŭaar ĕs hət tüalet?
Pardonu, ĉu tiu ĉi loko estas libera?	Sorry, is deze plaats vrij?	ĕs deezə plaats vrej?
Mi loĝas en la junulargastejo	Ik woon in de jeugherberg	ĕk woon ĕn də jöhtherberĥ
Kie mi povas aĉeti bileton por la trajno?	Waar kan ik een treinkaartje kopen?	ŭaar kan ĕk ən trejnkartjə koopən?
Kie troviĝas bankaŭtomato?	Waar is er een bankautomaat/ATM?	ŭaar ĕs er ən bankaŭtoomaat/ATM
Mi bezonas poŝtmarkon por bildkarto en Eŭropo	Ik heb een postzegel nodig voor een postkaart in Europa	ĕk heb ən postzeeĥəl noodəĥ voor ən postkaart ĕn eŭroopa
Ĝis revido!	Tot ziens!	tot zins
Kiam estos matenmanĝo?	Wanneer is het ontbijt?	ŭaneer ĕs hət ontbejt?
Ĉu mi nun povas mendi?	Kan ik nu bestellen?	kan ĕk nü bəstelen?

Enkonduko al la flandra nederlanda

Unu kafon/teon/bieron/fruktosukon, mi petas	Een koffie/thee/biertje/fruitsap alstublieft	ən kofi/tee/birtje/ sap alstüblift
Ĉu mi povas pagi la fakturon?	Kan ik de rekening betalen?	kan ĉk de reekøning betaaløn?
Morgaŭ mi forveturos	Morgen vertrek ik	morgøn vørtrek ĉk

Kelkaj ne-Esperantovokaloj:

Aa, ee, oo	↔ duobla vokalo, prononcu ĝin pli longe
ə	↔ muta sono
ĕ	↔ io inter la “e” kaj la “i”
ü	↔ kiel en la germana “für” aŭ la franca “nature”
ŭ	↔ kiel en la angla “word”

LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (IFEF) “La reloj ligas la landojn, Esperanto la popolojn”

Fervojistoj aŭ ne-fervojistoj: membriĝu!

Sed ni estas malferma organizo. Eĉ **sen membriĝo**, ni atendas de vi rakontojn pri viaj spertoj dum trajnvojaĝoj, informojn pri fervojo aŭ alispeca transporto en via lando aŭ regiono, pri trafiko moderna aŭ per nostalgiaj trajnoj.



Ne hezitu kaj skribu!

Se vi deziras kontakti nin, jen niaj kontaktkanaloj:

✉ ifefesperanto@gmail.com

🌐 www.ifef.net

📘 www.facebook.com/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio-726039834155372/

BAFE estas la belga sekcio de IFEF

Belgoj povas aliĝi al BAFE kaj IFEF ĝirante € 10 aŭ € 16 al kontonumero **BE85 6105 5937 1106** nome de Margaretha Symoens. Tiamaniere vi ricevos la revuon “Internacia Fervojisto” kaj rabaton je la aliĝkoto de la samjara IFEF-kongreso.

Por € 10 vi ricevos la retan version de la revuo, por € 16 la paperan version.

Publika transporto en Antverpeno

La Flandra Transportkompanio “De Lijn” ekspluatas la urbo-transporton en Antverpeno per busoj, tramoj kaj tram-metroo (kiuj uzas tunelojn sub la urbo kaj rivero Skeldo, nome linioj 2, 3, 5, 6, 9 kaj 15). En Antverpeno estas ok stacidomoj: Antwerpen-Centraal, -Berchem, -Dam, -Luchtbal, -Noorderdokken, -Oost, -Zuid kaj Hoboken-Polder; el kiuj la stacidomoj Antwerpen-Centraal kaj -Berchem estas la plej gravaj fervojaj nodoj. Antverpeno havas rektajn fervojajn kunligojn al Gento (linio 59), Roosendaal (linio 12), Mechelen (linioj 25 kaj 27), Puurs (linio 52) kaj Lier (linio 15)

Normala bileto kostas € 2,5 kaj validas dum 1 horo aŭ pli se vi ŝanĝas buson aŭ tramon antaŭ la fino de la horo.

Jen superrigardo de aliaj ebloj:

- Bileto por iri kaj reveni: € 5
- Karto por 10 vojaĝoj: € 17
- 24-hora bileto: € 7,5
- 72-hora bileto : € 15
- Grupa bileto por pli ol 10 personoj: po € 1,7 por persono

Eblas aĉeti la biletojn ĉe aŭtomato aŭ giĉeto kaj pagi per bankkarto (Maestro, Visa, Mastercard). Vi devas ĉiam skani la biletojn ĉe la flava maŝino kiam vi eniras buson aŭ tramon. Ankaŭ eblas skani vian bankkarton ĉe la blanka maŝino en la buso aŭ tramo. Tiam vi pagos po € 2,5 por vojaĝo kun maksimumo de po € 7,5 por tago. Ankaŭ eblas fari tion por 5 personoj per unu bankkarto. Vi devas skani vian bankkarton en maksimumo de 2 minutoj.

Ĉe la blanka maŝino vi ne ricevos paperon kiel pruvilon.



Tramnet Antwerpen


vanaf 13 maart 2023

TRAMLINIEN

- 1 P+R Merksem - Zuid
- 2 Hoboken - P+R Merksem
- 3 P+R Merksem - P+R Melsele
- 4 Hoboken - Berchem Station
- 5 Wijnegem - P+R Linkeroever
- 6 P+R Luchtbal - P+R Olympiade
- 7 Mortsel - Eilandje
- 8 P+R Wommelgem - Astrid
- 9 Slisburg - P+R Linkeroever
- 10 Wijnegem - P+R Schoonselhof
- 12 Schijnpoort - Centraal Station
- 15 P+R Boechout - Regatta
- 24 Slisburg - Havenhuis

LEGENDE

- halte
- eindhalte
- metrohalte
- belangrijke halte
- knooppunt



Tram 6 en tram 12 kunnen de halte 'Sportpaleis' niet bedienen door de werken voor de Oosterveelverbinding. Stap af aan 'Schijnpoort' als je naar het Sportpaleis wilt.

Door een aantal grote werken op de relweg van tram 11 is er vanaf 13 maart 2023 meer dan een jaar lang geen bediening op deze lijn.

ZWIJNDRECHT

15 Regatta

3 P+R Melsele

5 9 P+R Linkeroever

7 Eilandje

12 Centr. Station

8 Astrid

12 Schijnpoort

24 Havenhuis

6 P+R Luchtbal

1 6 P+R Luchtbal

24 Havenhuis

24 Havenhuis

10 Wijnegem


5 10 Wijnegem

8 P+R Wommelgem

8 P+R Wommelgem

4 Berchem Station

Mapo kun la ĉefaj lokoj



Praktikaj informoj



Jen la telefonnumeroj de kelkaj LKK-anoj kiujn vi povas kontakti dum la kongreso por urĝaj aferoj:

Kristin (+32 499 266 828), **An** (+31 413 352 894), **Piet** (+32 472 257 918), **Nicky** (+32 476 910 937), **Yves** (+32 472 106 086)

Grava telefonnumero por polico, fajrobrigado kaj urĝa medicina helpo: **112**.



En la kongresejo estas sekura bicikla parkejo. Demandu la kodon ĉe la akceptejoj kaj ĉiam ŝlosu vian biciklon.



La kodo por vifio en la junulargastejo estas **guests2023**. Dum preparvizito evidentiĝis, ke la retkonekto ne estas tre rapida. Ni tial rekomendas uzi interreton per via poŝtelefono (4G).



Gastoj en dupersona ĉambro ricevas unu ŝlosilon, gastoj en kvarpersono ĉambro du ŝlosilojn.



La tagmanĝoj estos akurate je la 12:30 krom marde je la 12:00. La vespermanĝoj je la 18:30. Vegetaranoj iru unue.



Apotekoj en la apudeco:

1. City Pharma, Kammenstraat 61, 2000 Antwerpen (lundo-vendredo 09:00-12:30 kaj 13:00-18:00, sabato 09:30-18:00)
2. Nationalestraat 70, 2000 Antwerpen (lundo-vendredo 08:30-12:30 kaj 13:30-18:30)



Superbazaro Proxy Delhaize, Nationalestraat 48, 8:00-20:00 ĉiutage.



En la Nationalestraat estas multaj restoracioj kaj kafejoj. Jen kelkaj kafejoj:

1. Panos, Nationalestraat 84
2. Bistro Theo, granda kafejo sur agrabla placo, Nationalestraat 33
3. Kaffeenini, kafejo sur alia placo, Nationalestraat 114.



Al la kongresa retejo **ifef2023.net** ni aldonis komunan fotaron. Vi povas libere aliĝi al la albumo en Google Photos kaj rekte alŝuti viajn fotojn tie. Se vi preferas, sendu viajn fotojn al Yves per retroŝto (yves@ikso.net) kaj li ilin alŝutos por vi.

Jen dek bonaj kialoj por aboni ĝin nun!

1

Por MONATO raportas ne eksterlandaj ĵurnalistoj, sed lokaj esperantistoj, kiuj konas la tieajn fonojn.

2

MONATO havigas plej variajn komentojn pri la mondaj novaĵoj.

3

En MONATO la intelektularo de la Esperanto-movado diskutas, fojfoje vigle polemikas pri gravaj temoj de la nuntempa socio.

4

MONATO estas la magazino en kiu ankaŭ vi povas aperigi viajn komentojn.

5

MONATO plilarĝigas vian spektron de interesigo, pro aro da nekutimaj temoj prezentitaj en facile digestebla maniero.

6

MONATO pligrandigas vian lingvokonon. Ĝi estas redaktata en bona hodiaŭa Esperanto.

7

MONATO jam dum 43 jaroj regule aperadas.

8

MONATO estas magazino sen amasa reklamo.

9

MONATO estas ellaborita ekde la redakto ĝis la forsendo, per la kranioj kaj la manoj de esperantistoj.

10

Per MONATO vi vivtenas kaj subtenas prestiĝan eron en la Esperanto-movado.

... kaj vi kiel nova abonanto nun ricevos MONATON dum 15 monatoj kontraŭ la prezo de nur unu jaro!

Mendu ĝin tie ĉi aŭ rete pere de www.monato.be/rabato!